# P A C O

## OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

Fondita en 1953. ĈEĤOSLOVAKA ELDONO Februaro-marto
N-o.39 – 40. 1957

### PALPADO EN MALLUMO

La subitaj okazintaĵoj en la mondo, en Egiptio, Alĝerio, Hungario kaj alie kaŭzis konfuzon en la kapoj de multaj sinceraj homoj. Komence fakte estis malfacile difini je kiu flanko estas la pravo. Precipe konfuziga estis la situacio en Hungario. Nek la Monda Packonsilantaro tuj kapablis havigi al si tute klara vidpunkton. Sed tio ne estas miriga, ĉar ĉiu scias ke en la Monda Pacmovado, same kiel en la „MEM" kolektiĝas diverstendencaj pacamikoj. Parto da ili kondamnis la sovjetan intervenon en Hungario kaj la alia parto ĝin aprobis kiel absolute necesan. Tial la Monda Packonsilantaro ne povis akcepti definitivan starpunkton, eldoni rezolucion aŭ alvokon unuflankan, ĉar ĝi estus kaŭzinta certan dividon de pacamikoj en du sin kontraŭ-starantajn movadojn. Inter MEM-anoj kaj eĉ en la estraro regis similaj opinioj kaj verŝajne ankaŭ tial la tiutempaj eldonantoj evitis tuŝi ĉi problemon en nia organo „PACO". Ĉu tia konduto de la gvidantaj pacdefendantoj estis ĝusta, pri tio al ni eble respondos la estonto.

Hodiaŭ la situacio jam estas pli klara. Fakto estas, ke la hungara popolo, iniciatita de studentoj kaj laboristoj en Budapesto ekkomencis antaŭ monatoj per stratdemonstracioj ribeli kontraŭ la burokrata miskomunisma reĝimo, kiu dum jaroj nekapablis doni al la popolo ĝojigajn vivkondiĉojn, sed klopodis per ĉiuj rimedoj subpremi la kreskantan malkontenton de la popolo. Hungario, kiu estis ĉiam ekonomie forta lando kaj ankoraŭ post la ununa mondmilito konsiderata kiel grejnprovizejo de Eŭropo, suferis mizeron. Gvidantaj personoj riĉiĝis, vivis en absoluta komforto kiel burĝoj, dume la popolo ĉiam pli kaj pli proletiĝis, ĝis fine neplu tolerebla situacio devigis ĝin al ribelo kontraŭ tiu registaro. Denove montriĝis pravaj la vortoj de Lenin: „Neeblas je daŭro regi sur bajonetoj!" La sovjeta komunista partio kaj ĉiuj ceteraj ankaŭ fine aprobis la malkontenton de la hungara popolo kaj konsentis kun ĝiaj deziroj k. plandoj.

Sed la internacia reakciularo dum tiuj okazintaĵoj ne dormis. Kiel ŝakalo ili sin ĵetis al la en agonio batalinta popolo por eluzi la situacion al sia prospero. La reakcio bone konscias, ke en malpurigitaj akvoj estas facile kapti fiŝojn. Kaj se ili sukcesus el la ĉenaro elrompi almenaŭ unu ĉenon, ili facile sukcesus poste elrompi pluajn. Komencis ruza kampanjo pere de internacia gazetaro, radio, rifuĝintoj ktp. Ili elsendis sian tutan spionaron kune kun la iamaj Horthy-oficiroj kaj aliaj faŝistaj elementoj al Hungario por konfuzigi per ruzaj lozungoj la ankoraŭ sincere luktantajn popolamasojn.

Tio jam montriĝas al ni klare. Kiam post deziro de Imre Nahgy la rusaj trupoj forlasis Budapeston, la amasmovado perdis sian sincere revolucian karakteron kaj transiris al plej brutalaj faŝistaj metodoj. Pacamikoj certe opiniis, ke post la foriro de sovjetaj trupoj, la budapesta popolo transprenos trankvile la registaron, aranĝos ordon kaj la vivo en la urbo kaj lando akceptos ree normalan formon. Sed, ho ve – la faŝistaj bandoj komencis furiozi. Ili parte kaj eble eĉ grandparte sukcesis furiozigi eĉ bona civitanoj, kiuj estis malkontentaj kun la misreĝimo. Komencis sensence murdado, komunistojn oni pendis sur la stratlaternojn, la proprajn historiajn konstruaĵojn oni demoligis, valoraj naciaj trezoroj estis ruinigitaj kaj interfrata kruela batalo senĉese furiozis kaj rabis la vivon de multaj bonaj homoj. Ni scias, ke dum revolucio oni ne rigardas, ĉu prave aŭ malprave. Ofte tute sen kulpaj homoj en tiaj tagoj perdas siajn vivojn. Sed ĉi tie estas jam klare, ke la amasoj lasis sin trompi per ruzaj lozungoj kaj eraris terure sur sia bone komencita vojo. La plej malluma reakcio sukcesis ekregi la sincere ribelantan popolamason kaj instigi ĝin al pli kaj pli grandaj jam faŝistaj teruraĵoj kaj murdoj. Sinceraj civitantoj kaj popolaj gvidantoj subite perdis la regpotencon kaj eble ne estus Imre Naghy forveturinta al Rumanio, eĉ li fine estus perdinta en la faŝista ĥaozo sian vivon.

Ĉu ni nun aprobu, ke la sovjeta armeo ne restis flankestarinta kun pafiloj ĉe piedoj kaj falditaj manoj, trankvile rigardinte la furiozadon de faŝistoj, sed reveni spor ree starigi ordon? Certe ke ĉiu vera pacamiko devas nun diri: Jes, ĝi agis prave!

Kaj plua dokumento:

Post la faŝista kaj reakcia furiozado Budapesto multloke ankoraŭ staris en flamoj. La abundaj domaĝoj ankoraŭ ne estis forigitaj, minejoj subakvigitaj pro longadaŭraj strikoj, ne estis karbo, mankis elektra energio. La vivo ne ankoraŭ estis en almenaŭ iomete normala funkcio, kiam la Kádár-registaro apenaŭ pene sukcesis parte konvinkigi la laboristaron, ke nun necesas reeniri la uzinojn kaj komenci la produktadon por ripari la domaĝojn k. renormaligi ekonomian situacion en la lando. Tiam denove reakciaj elementoj ruze instigis la laboristojn al pluaj strikoj. Ili estis instigitaj tujan plialtigon de siaj salajroj, starigi dum tia mizera tempo absolute neefektivigeblajn postulojn. Ĉu tiaj postuloj estis pravaj? Ĉu eblas al iu doni ion, se ĉie estas nenio? La reakcio intence instigis la laborulamasojn al tiaj postuloj, ĉar ĝi nepre bezonis daŭrigon de la ĥaoso. Ĝi eblo kun ĝojo estus akceptinta eĉ eksplodigon de nova milito helpe de la hungaraj okazintaĵoj. Sed dank` al la sovjeta interveno iliaj ambicioj estis vanigitaj.

Kial en Polio la situacio akceptis tute aliajn formojn?

Simple tial, ĉar (vidu la landkarton!) la eniro por la reakcio estis pli malfacila.

La pozicio de la provizora hungara registaro kaj de la sovjetaj trupoj estis vere tre malfacila, ĉar kiel ili distingu la naskitajn reakciulojn de la erarigitaj kunkurantoj kaj aliel sinceraj homoj? Da sovjeta interveno, kiu malgraŭ la minacantaj tankoj kaj armiloj estis sufiĉe amika, tamen helpis sufoki la ruze preparitajn atakojn de la internacia reakcio kontraŭ la interesoj de la hungara popolo kaj la socialista tendaro entute.

Nun la tutmondaj pacamikoj kun intereso.kaj atento sekvos la pluan evoluon de la hungara problemo. Ni ekvidos ĉu la Kádár-registaro kaj post ĝi la nova laŭleĝe starigota registaro sufiĉe spertis kaj lernis el la pasintaj okazintaĵoj kaj eraroj kaj prezentos al la hungara popolo pli konvenajn kondiĉojn por la konstruado de paco kaj socialismo en sia lando. La estonto montros al ni ankoraŭ pli klare

(Daŭrigo sur paĝo 7a)

## LA PLEJ GRAVA PROBLEMO

Preskaŭ ĉiuj esperantistoj trograndigas la rolon de sia lingvo. Sed la lingvistika problemo ne estas la plejgrava en si mem. Esperanto devas esti rimedo por atingi iun celon, ne la celo mem.

La plej grava el inter ĉiuj problemoj estas la defendo de la mondpaco. Esperanto povas kaj devas helpi al la paco, sed kiel?

Por defendi la pacon oni devas lukti kaj senmaskigi ĉiujn militinstigantojn kaj ataki ilin. Pro tio oni devas formeli tian neŭtralecon, kiu ne kontribuas al la paclaboro. La neŭtralaj Esperntoorganizoj, naciaj kaj internaciaj, ne kondamnas la imperialismajn k. faŝismajn atakojn kontraŭ la paco faritajn de Francio, Britio, Izraelio kontraŭ Egiptio kaj Alĝerio, kaj la agreson de la internacia reakciularo kontraŭ Hungario.

Kaj tiuj organizoj silentas pri la freneza armado, pri la militbazoj en Japanio, Germanio Hispanio k.a. Krome ili silentas pri la luktoj kaj sukcesoj de la popoloj por la paco kaj ili preskaŭ timas mencii en sia gazetaro pri la ekzisto de la Mondpaca Esperantista Movado. Tiuj organizoj ja estas neŭtralaj kaj tial estas pli grave por ili, defendi sian neŭtralecon ol la pacon.

La aserto de la neŭtrala Esper.movado, ke ĉiu esp-isto estas pacamiko, estas absurda naiveco – ĉar ĉu nur pacdefendantoj lernas Esperanton? Aŭ ĉu militemulo reklamante Esperanton mirakle transformiĝas en pacaman homon?

Montriĝas, ke „MEM“ tago post tago estiĝas pli necesa por gvidi kaj informi la esperantistajn pacamikojn. Kaj „MEM“ kaj ĉiuj Esperanto-organizoj povas kaj devus kunlabori tute frate en la lukto por defendi la mondpacon.

Pri tia kunlaboro jam klarigis k-do. Burda en „PACO“ n-o 34-35 la j.1956.

X el Hi-o.

## ĈU DENOVE WAFFEN-SS ?

Laŭ oficialaj cifero estas 1.300 eks-SS-anoj dungitaj en la novan okcidentgermanan armeon „Bundeswehr“ kaj de tiuj estas 33 oficiroj. Waffen korpigis dum la lasta milito en la sklavigitaj landoj teruron kaj morton. Sed pro la militista kunlaboro en la Atlantika Pakto kaj en la Okcidenteŭropa Unio devas nun Belgoj, Francoj, Danoj, Norvegoj kaj aliaj kunlabori kun tiuj militkrimuloj. Ne mirige, ke tia kunlaboro ĉe ĉiuj honestaj ĥomoj elvokas malagrablajn memorojn kaj abomenon. Kaj nun la aŭtoritatoj el Bonn volas armi la „Bundeswehr“ on per atombomboj.

SS-oficiroj kaj atombomboj estas objektoj, kiuj devas maltrankviligi ĉiujn, kiujn tre alte taksas la interesojn de la paco.

Okcidentgermano

## PAFISTOJ DE TIMIGAĴOJ

En la :Manifesto de „MEM“ ni legas, ke „militinstigantoj, magnatoj de industrio, komerco kaj financo ne volas pacon.“

Sed ili volas konservi la „politikon de forto“ kaj por tiu celo ili uzas ĉiajn timigilojn kontraŭ la popoloj kaj dissemas venenajn semojn de teruro k.suspekto.

Montgomery, kiu defendis la planon pri batalo kontraŭ la komunismo, deklaris:

„Ne estas facile konservi la solidarecon, se ne troviĝas timego,“ (temas do pri solidareco inter la kapitalistaj ŝtatoj kontraŭ la socialistaj, mia rim.).

Kaj la eks-ĉefkomandanto de la NATO-trupoj, generalo Gruenther plendis:

„Okaze de la sovjeta politiko de kunekzistado ekmontriĝis la danĝero, ke la timego malaperus.“

Do, la militorganizantoj evidente bezonas la timegon por sia aĉa politiko. Kaj pro fiasko de ilia agreso kontraŭ Egiptio kaj Hungario, ili nun ŝaŭmas de furiozo kaj provas ripari siajn malsukcesojn de la pasinta jaro.

Tio estu instruo por la esperantistaj pacdefendatoj, ke la batalo por paco kaj socia progreso estas sensenca sen batalo kontraŭ imperiismo kaj reakcio.

Pacamikoj volas vivi en sekureco, paco kaj sen timo. Sed por atingi tion estas necese, ke ŝtatoj de diversaj socireĝimoj kunlaboru, ĉar sen paca kunekzistado ne eblas atingi daŭran

*(nelegebla, eble :Internaciismon)*



## ADIAŬO AL PROF. JOSEF SKUPA

Marde la 8an de jan.frumatene mortis subite en Praha la nacia artisto, profesofo Josef SKUPA, posedanto de la ĉeĥoslovaka premio de paco.

Estas multaj da tiuj, kiuj rememoras la marionetajn komencojn de la naskiĝinto el Strakonice, poste gimnazia profesoro en Plzeň, Josef SKUPA. Multaj ĉeestis la naskiĝon de marioneta teatraĵo „Spejbl kaj Hurvínek“ kaj povis ĝoje sekvi la riĉan 40jaran agadon de la mortinta nacia artisto, kreinto de la plej popularaj marionetoj de nia tempo.

Li estis donacinto de ĝojo tiom simpla kaj pura, iniciativa kaj viva, kia nur povas fonti el malferma, malegoisma homa koro. Ni ĉiuj admiris „Hurvínek“ kaj lian ĉarmajn kamaradojn, la tutan menaĝerion de la marioneta varieteo kaj lian vilaĝan orkestron, kiu tiom entusiasme ludis. Ni ĝojis pro la optimisma rido, kiun kaŭzis al ni „Hurvínek“ per sia ne imiteble komika kaj infane serioza scio, filozofio kaj per siaj travivaĵoj. Ni estimis profesoron Skupa kaj amis liajn marionetojn, ĉar Skupa, artisto kun varma kaj popola koro malkovris kaj reale kreis tute novan tradicion de nia pupteatro. Li sukcesis esprimi pere de siaj marionetoj pensmanieron de homoj de nia epoko, iliajn ĝojojn kaj malĝojojn, iliajn ideojn kaj agojn. Li famigis per sia pura nacia arto la nomon de nia patrio malproksime en la eksterlando. Tial liaj marionetoj restos por ĉiam karaj al ni kaj vivantaj.

Marde je la 4a horo matene adiaŭis de ni la nacia artisto Josef Skupa por ĉiam. Ĉesis bati lia koro, orfiĝis lia loĝejo en Praha – sed liaj marionetoj vivos. La tradicio de „Spejbl kaj Hurvínek“ estas tro viva ol ke ĝi povu tion subite finiĝi. Ni tamen rememoros ĉiam tiun, kiu donis al ili la aspekton kaj voĉon kaj inspiris al ili la vivon. Ni ne povas plu bondeziri al Josef Skupa ĉion bonan okaze de lia 65a naskiĝdareveno, kiun festi preparis sin en tiuj ĉi tagoj la tuta mondo, kiu konas kaj amas „Spejbl kaj Hurvínek“.

La morto de la eminenta artisto estas doloriga perdo por la ĉeĥoslovaka popolo. Ĝi estas des pli doloriga, ke ĝi trafis nin tiom subite.

PAVEL GRYM

El la ĉeĥoslovaka gazeto „LIDOVÁ DEMOKRACIE“ tradukis:

Jiřina H O L Á

P r a h a

## NOVA POSTULO KONTRAŬ ATOMARMILAJ EKSPERIMENTOJ

Svedio proponis en UNO la 21.1.1957 ĉesigi la atomarmilajn eksperimentojn dum du jaroj por ebligi specialan UNO-komitaton esplori la efikojn de la radiaktiva radiado.

La situacio estas el genetika vidpunkto – laŭ la propono – pli serioza ol oni ĝenerale opinias. Ĉiu plua disvastiĝo de radioaktiva radiado estas malutila. Tial necesas, se eblas, ripari la domaĝojn, kiujn povas esti jam faritaj.

La tutmondaj pacamikoj senpacience atendas, ke la Unuiĝintaj Nacioj tuj faros pozitivan decidon por realigi tiun kaj multajn aliajn similajn proponojn. Necesas haltigi la eksperimentojn kun nukleaj armiloj senprokraste. Ĉar morgaŭ eble jam estos malfrue.

## DIRITE PRI NUKLEAJ ARMILOJ

La hidrogena bombo sendube ektermos grandan parton de la homaro kaj estas naive esperi, ke la vivo, kiu restus, montros iajn homajn trajtojn.

Prof.Oppenheimer, *10/1.55*

Ses horoj da neniiga milito, 6 jarcentojn por ripari la difektojn.

Prof. Einstein

Plimultigo de hidrogenaj eksplodoj enkondukos ŝanĝiĝojn laŭ ne elesploritaj leĝoj kaj kreskanta manko de ekvilibro ĉe la naturkondiĉoj al kiuj la floraro kaj bestaro malrapide sin adaptas.

Nobelpremiito Louis de Broghe

## KULTUREKSKURSO

La Mongola Popolrespubliko havis en 1956.j.349 fund.lernejojn, 56 sepjarajn lernejojn kaj la teknikajn. Ŝtatan universitaton vizitas 2000 gestudentoj.

N.T.

# LA SPORTMOVADO KAJ MEM

Malgraŭ pluraj provoj dum la pasinta tempo ne estis eble enpenetrigi Esperanton en la sportmovadon. Daŭre ambaŭ estas disigitaj unu de la alia. Tio ja ne signifas ke la sportistoj senescepte havas indiferentan sintenon rilate al la internacia lingvo. Certe ekzistas multaj junaj esp-sportistoj, kiuj bone scias, ke la esperanta kaj sporta movadoj sur la internacia tereno parte povas kompletigi unu la alian. Sed oni ne povas diri, ke la Esp-gazetoj en sufiĉe alta grado kaptas la intereson de junaj sportistoj. Preskaŭ nenian oni en tiuj gazetoj povas legi ion pri praktikado de sporto. Sed des pli ofte, skeptikajn kaj malfidajn artikolojn. Oni ŝajne opinias, ke gejunuloj interesataj pri sporto nek havas emon nek tempon por studi la internacian lingvon. Kaj tial estus senutile prezenti sportartikolojn en la Esp-gazetoj.

Sed kvankam la fizika edukado estas la ĉefaĵo de la sportmovado kaj ĝiaj multnombraj kluboj, onine malatentu la fakton, ke la sporto ankaŭ havas spiritan kaj politikan signifon, kies valoron oni neniel subtaksu! Artikoloj, kiuj respegulas tiun flankon de la sportvivo interesus ne nur sportulojn, sed ĉiun, kiu volas sekvi la evoluon de la tempo. Tial tiaj artikoloj havu lokon ankaŭ en „PACO“.

Ĉiu, kiu vivas en la „libera mondo“ ĉiutage povas konstati, ke la monopolkapitalistoj, kiuj estras la publikoninstigajn organojn, la ĵurnalaron, radiofonion, libroeldonejojn, kinejojn, teatrojn ktp. ĉiel provas subfosi la moralon de la juna generacio. Ili provas daŭrigi la „malvarman militon“ kaj celas krei malamikecon inter „siaj“ popoloj kaj la popoloj, kiuj forgisis la kapitalismon. Kaj tiuj reakciaj rondoj provas ebenigi la vojon al nova, plej abomena faŝismo.

En la batalo kontraŭ malamo kaj malvarma milito, kontraŭ fikondukto kaj morala degenerado, la sportmovado estas unu el la plej gravaj faktoroj. Nur en batalo kontraŭ propagandistoj de interpopola malamo kaj ŝovinismo la sportmovaddo povas efektive plenumi sian mision.

Tial „MEM“ kaj la sportmovado kompletigas sin reciproke. Kaj la personaj kontaktoj inter gesportistoj el kapitalistaj landoj k. socialistaj povas forigi multajn miskomprenoj. Por tiu celo necesas al la sportistoj la internacia lingvo.

La juna generacio vivas en tempo de sociaj transformiĝoj. Printempaj torentoj batas al si vojojn tra putraj digoj, kiuj disigas la popolojn. Tiajn digoj falos. Hodiaŭ la sporto estas unu el la vojoj al pli bona kontakto kaj interkompreno. Kaj internaciaj kontaktoj povas savi la junularon el sub la ungoj de reakciaj delogantoj. Kaj da tiuj estas multaj en okcidenta sportmovado. Ili konsistas el generaloj, reakciaj politikistoj, magnatoj de industrio, komerco kaj financo.

Oni ne opiniu, ke tiuj sinjoroj estas politike neŭtralaj. Male, ili pli malpli estas agentoj de la imperialismo. Tial ili nun en la signo de malvarma milito forte kontraŭstaras interlandajn sportkonkursojn kun sovjetaj kaj hungaraj sportistoj. Kaj ili elverŝas sian koleron kontraŭ Sovjetio kaj la demokrataj fortoj en Hungario, kiuj malhelpis la imperialistojn krei militbazojn en Orienteŭropo.

Ke la gvidantoj de la okcidenta sportmovado estas kontraŭtiaj sport konkursoj, montras klare la karakteron de la t.n. „neŭtrala“ sportmovado. Tial sportistoj, kiuj volas pacan kunekzistadon kun la socialismaj landoj (kaj kiu honesta sportisto ne volus tion?) devas kontraŭbatali la reakcian politikon de siaj gvidantoj, kiu ne havas ion komunan kun la vera ideo de la sportmovado.

Kaj kompreneble ĉiu sportisto-esperantisto, kiu volas aktive labori sur Esperanto-kampo por paco kaj interpopolaj konkursoj, havas sian domicilon en „MEM“

*Sportisto-MEM-ano*

## NOVA MINACO KONTRAŬ LA PACO

La imperialistoj ne ripozas. Post la fiasko de ilia agreso kontraŭ Egiptio, ili per nova „doktrino“ provas fortigi siajn poziciojn. Tiu nova „doktrino“ estas nomata „Eisenhower“ aŭ „Dulles“-doktrino kaj estas direktita kontraŭ la mondpaco kaj la sekureco de la popoloj. Ĝi estas minaco precipe kontraŭ la popoloj de la Proksima Oriento kaj ĉiuj ĉiuj aliaj landoj en oriento, ĉar ĝi estas provo de la amerikaj imperialistoj atingi per aliaj rimedoj tion, kion la angle-franca interveno celis.

La iniciatintoj de la plano krias pri „komunista minaco“ kontraŭ la araba mondo. La melodio estas konata, sed falsa, ĉar la minaco ne ekzistas. Sed la amerika imperialismo por tiu ĉi doktrino provas realigi siajn konkerplanojn je la kostoj de siaj rivaloj, Anglio kaj Francio. La rezultato estos, ke la kontraŭecoj inter la imperialistaj ŝtatoj neeviteble pliakriĝos.

Antaŭ la nova minaco kontraŭ la paco, la pacamaj fortoj nepre devas vanigi la planojn de la agresivaj rondoj. La pacdefendantaj popoloj devas fortigi sian batalon kontraŭ la novaj provokaĵoj de la pacamikoj. La defendo de la mondpaco kaj nacia sendependeco tion postulas.

Atseogo

## ANTAŬEN AL LA FESTIVALO!

Aŭtune 1956 komencis lerni Esperanton 6 rondetoj en nia urbo Kujbiŝev (USSR). Entute studas la lingvon ĉ.100 gek-doj. Ili volas ekposedi Esperanton antaŭ la Tutmonda Festivalo de Junularo en Moskvo. Ili volas paroli kun siaj eksterlandaj gekamaradoj per vortoj de Amikeco sen tradukistoj. Tial ili lernas Esperanton.

Jen kion skribis al nia redakcio unu el la rondetanoj, kamarado Zaderako. Li estas artista gvidanto de la klubo „Zarja“ (Aŭroro).

„Mi estas feliĉa rakonti iom pere de „PACO“ pri la laboro en nia klubo „Zarja“, kies gvidanto mi estas. Komence ni preparas nin per la Tutsovjeta Festivalo de Junularo, kiu okazos antaŭ la Tutmonda. Ni, klubaj partoprenantoj de arta memagado, esperas esti inter la plej bonaj kaj viziti Moskvon dum la Festivalo. Ni studas kaj ekzercas ĥorajn kantojn, grupajn dancojn, aranĝas artajn konkurojn de prelegantoj, kantistoj, dancistoj ktp. Ni agas energie, pasie. Nian ekzemplon sekvas novaj kaj novaj gejunuloj, kiuj organiziĝas en novaj artistaj grupoj.

La festivalo de junularo estos antaŭ ĉio festo de amikeco, festo de unuiĝo de junaj homoj en la intereso de la paco. Por pli facile trovi amikon, paroli kun li amike, anime, necesas kompreni unu la alian. Tial multaj gejunuloj lernas nun Esperanton. Ĉi tiu lingvo havas tre grandan signifon. Ĝia facileco, belsono kaj ĉefe, en la nuna okazo, ĝia racieco faras ĝia ekskluzive grava instrumento de paco kaj amikeco.

G.Zaderako, gvid.de Klubo „Zarja“, KUJBIŜEV,S-U

## TUTMONDA ESPERANTISTA ĴURNALISTA ASOCIO (TEĴA)

Ĉiu ĵurnalisto scipovanta Esperanton nepre aliĝu al TEĴA, kies celo i.a. estas:

Per interŝanĝoj de artikoloj, anketoj, informoj ktp. uzi Esp-on por praktikaj celoj.

Membreco: A-membro estas ĉiu profesia ĵurnalisto, B-membro estas ĉiu, kiu pli okaze kunlaboras en gazetoj, verkistoj kaj redaktoroj de esperantaj gazetoj. La adreso de la sekretario estas:
Redaktoro G.JEPSEN, Silkeborg Avis SILKEBORG, Denmarko.

## PREPARU VIN POR LA JUN. FESTIVALO

Mi vekas vin en la nomo de la Esp-ista Iniciativa Grupo de la Moskva Universitato. La grupon ni organizis por la festivalpreparoj. Ĝi estas en konstanta kontakto kun la Moskva Festival-komitato. Ni volas kontakti kun vi por interŝanĝi informojn rilate la festivalon.Kiel vi scias,la festivalkomitato

metis sur sian programon kunveno de esperantista junularo. Ĉi kunveno havos grandan signifon por la Esperanto-movado entute. Ni deziras, ke ĝi plen-plene sukcesu. Ni devas ĝin perfekte prepari kaj jam nun komenci la agadon en tiu sence. Unue ni bezonas raportojn, kiel sin preparas vialanda Esp-junularo por viziti la Moskvan Festivalon,

*(daŭrigo sur paĝo 9a)*

PALPADO EN MALLUMO (Daŭrigo) ĉu niaj konkludoj pravas aŭ ne.

Pli klara jam estas la sitaŭacio en Egiptio kaj Alĝerio. La internacia kapitalismo tie batalas, misuzante la nekonscion de aliaj popoloj por subjugi al si tiujn landojn kaj riĉigi sin el ties naturaj trezoroj. Kompreneble ni, pacdefendantoj, ĉiam devas helpi per ĉiuj rimedoj por la liberigo de tiuj popoloj el la imperialista jugo kaj sklava vivo. Ĉiu popolo rajtas esti memdecida kaj sendependa.

Rudolf BURDA
prezidanto de MEM

## P A C O – E S T A S – L A – C E L O – BONA-VOLO-LA-RIMEDO

Hodiaŭ jam ĉie aŭdiĝas la vorto paco. Ĝi travibras la eteron. Pri ĝi ni legas en ĉiuj gazetoj. Diversaj konkuroj kaj entreprenoj estas aranĝitaj sub la devizo paco. Tamen paco ne estos akirita nur per tio, ke oni kapablas produkti pli da ŝtalo, da tankoj kaj raketaviadiloj ol siaj kontraŭuloj, sed per sociala justeco, protekto de malgrandaj nacioj kontraŭ grandpotencoj, per protekto de simpla civitano kontraŭ malico de potencreprezentanto. Ni ordinaraj homoj, samtempuloj de du mondmilitoj kaj iliaj viktimoj – nin kunigas naŭzo al ĉiu milito. Ni konsistigas elementan, kontraŭmilitan blokon en la mondo.

Sed troviĝas ankaŭ iuj, kiuj sukcesis eskapi ĉiujn militterurajôjn. Al tiu la vorto paco estas sensignifa. Aliel pacon konceptas militinvalidoj, kripluloj, orfoj kaj vidvinoj. Ĉiuj tiuj tre bone scias, ke el la atmosfero de timo, suspektado kaj el la armitaj tendaroj eblas sin savi nur per grandioza internacia amikeco. Kaj ĝi signifas venkon super la malbono en ni mem.

Tial estas necese alproprigi al si per paco necesajn mora ... *(linio mankas)* por favore efiki je nia lingva disvastigo kaj firmigo de l` paco. Kompreneble, ankaŭ en la plej bone interkonsentita socio povas aperi disharmonio inter la individuaj anoj.

Ni esperantistoj posedas en nia neŭtrale homa lingvo la elprovitan ilon, kiu sukcesis en ni rompi la murojn de egoista, individueca karaktero kaj krei amikecon trans la limojn. Ni klopodas gajni por nia amikeco homojn saĝajn, eminentulojn de vivarto, antaŭ kiuj ordinaraj granduloj estas muraj ombroj.

Oni ne povas malatenti la fakton, ke ni pacamantoj ne povas praktiki egalajn labormetodojn pro la malsamaj sociaj, politikaj, ekonomiaj cirkonstancoj kaj pro nia malsama spirita natureco.

Por ke nia agado estu ĝusta, necesas iom da memkritiko. Antaŭ ĉio, ĉiu el ni estu konscia pri tio, ke socio de pacamantoj postulas de ni oferojn, estas necese iom subordigi sin al ĝiaj principoj kaj organizaj statutoj. Ni ĉiuj devas iom suferi por la paco, kio cetere estas pli bona, ol poste en milito oferi nian posedaĵon, sanon kaj vivon.

En nia scio, pli ol en in alia organizo, devas esti aplikita interna demokratio. Tio signifas, ke ĉiu ano aktive partoprenu en ĉiuj kunvenoj. En la kunvenoj ĉiu trovu okazon por pli riĉigi siajn spertojn kaj prezenti siajn opiniojn. Ĉiu proponu kaj aprobu siajn funkciulojn kaj havu rajton proponi ilian eksigon. La plimulto havu la decidrajton.

Se vi atente legas ĉi traktaĵon, tiam vi rimarkas, ke sendepende de ia ekstera aŭtoritato kaj sen ĝia permeso estas al nia dispono la plej efika rimedo por konstrui pacon. Ĝi estas moralo kaj amikeco,

gato, sub neniu kondiĉo li devigus sian kunhomon perfidi sian nacion, klopodante invadi landojn malriĉajn, malfortajn, subigi nacion malpli progresintajn kaj nekulturajn ilian patrion helpe de religio aŭ per lingva agreso, malplivalorigante ilian gepatran lingvon.

Similan egoismon ni povas vidi ĉe multaj kleruloj kaj ĉe ĉiuj, kiuj okupas pli altan pozicion en la socio. Anstataŭ esti zorgantaj fratoj al siaj simplaj kunhomoj, ili serĉas kiel eble plej multe profiti el ties nescio.

Plua baro por la paco estas tiuj kiuj posedas riĉon kaj potencon. Tiuj havas ankoraŭ malmultan komprenon por tio, ke ankaŭ aliaj deziras plibonigi siajn vivkondiĉojn, evoluiĝi per ekkonado de vero kaj amo kaj per ĉiuspeca homa aktiveco klopodi, ke el ili kaj el la estontaj generacioj estiĝu homoj bonaj kaj kleraj, kapablaj supervenki malbonon en si mem kaj ekster si. Kiam delikatsentemo kaj plenumo de justeco fariĝos natura propraĵo de ĉiu unuopulo, tiam neplu estos militoj.

H. SLAVÍK
BRNO, Ĉeĥoslovakio

## ELTRANĈAĴO

Se la paco tiuflanke (flanke de francaj kaj germanaj industriistoj) ŝajnas esti certigita hodiaŭ, tio estas ĉar la magnatoj de Lotaringio kaj Rurteritorio fine konsideras, ke ilia intereso estas interkonsenti kaj krei akordon.

La mortintoj de Verdun (1916a j.) kaj alie, neniel povas influi tion. En la bilanco de tiu ĉi duonjarcento ili figuras sur la konto de profitoj kaj perdoj.

„La katenita amaso“

## VIVSIGNO EL BUDAPEST

Nia MEM-peranto, k-do.P.BALKÁNYI skribas, ke laŭ lia scio grava domaĝo nenium esp-iston trafis. Li mem kaj lia familio relative bonfaras kaj lia loĝejo estas sendifekta. Sed, la medicinaj instrumentoj de d-ro Kalocsay detruiĝis kaj li mem troviĝas malsana en hospitalo.

Espereble la prospera esperantista agado baldaŭ rekomenciĝos. Laŭ alia informo de ĉeĥoslovaka k-do. Jíra el Jablonec, troviĝas en la proviz.registaro kiel ministro de financoj, esp-isto k-do István KOSSA, kiu al li jam promesis helpon por la Esperanto-movado.

Geesperantistoj, kiuj dezirus per donacoj helpi al hungaraj gek-doj troviĝantaj en mizero, povas ricevi adresojn de tiuj pere de k-do.Lajos Kokény, Balassi Balint u.25 f., BUDAPEST-V. Ne forgesu aldoni resp.kuponon!

## LA HAŬTKOLORO DIFINAS LA CIVITANECON

La Sud-Afrika Unio estas policŝtato kaj neniu demokratio.

La ideoj de la iamaj Buroj, kiuj fondis la Union ordonas super vivo kaj morto de la Negroj kaj sisteme subpremas ilin. La Negroj devas transloĝigi al barakurboj, malproksimaj de la laborejoj, ili ricevas neniajn sociajn establaĵojn, sportejojn k. similajn. Al ili estas malpermesite viziti teatrojn, koncertojn kaj restoraciojn de blankuloj. Ludejoj en parkoj estas destinitaj nur por blankaj infanoj laŭ elpendigitaj informoj sur ŝildoj. Ne mirige, ke la junulara problemo de kriminaleco estas en la afrikaj grandurboj malfacila. Ofte okazas, ke Negroj estas mortige piedbatitaj en la policĉeloj. Inter la perfortaĵoj de la naciisma registaro plej teruraj estas tiuj, kiuj malbonigis la instruadon al la Negroj, i.a. per mortiga bato kontraŭ la misilernejoj, da kiuj en la jaro 1945 troviĝis 4.360 kontraŭ 230 ŝtataj.

La pozo de la anglikana kaj pluraj aliaj religi-kongregacioj estas cedema kaj indiferenta rilate al la raspersekutoj. Ili ne kuraĝas procedi kontraŭ naciismaj regantoj. Estas tiel, ke blankaj kaj nigraj

ekleziantoj ne povas sidi kune en sama halo dum ekleziaj ceremonioj. Ĉi neeltenebla situacio certe kondukos al interna milito, se ne okazos ĝustatempa ŝanĝo.

T.HUDDLESTON

9 –

## PREPARU VIN POR LA FESTIVALO

(Daŭrigo de la 6a paĝo)

Sciigu al ni, kiuj gek-doj intencas alveni kaj kiajn helpojn ili de ni bezonas. Informu nin regule pri ĉiuj tiurilataj novaĵoj kaj same ankaŭ ni raportos al vi. Skribu al k-dino: Ludmila BOKAREVA, Novopoŝĉanaja ul.21, korp.1, kv.9, MOSKVA D-252

## TRISTA STATISTIKO

Statistikistoj konstatis, ke la nombro de mortintaj soldatoj dum la 10a jarcento estis rondnombre 30.000. Dum la 11a jarcento la cifero altiĝis je 68.000. Poste la nombro de mortigitaj soldatoj konstante altiniĝis. En la 16a jarcento jam estis 759.000 kaj en la 19a jarcento 880.000.

Dum la unuaj 25 jaroj de la nuna jarcento mortis en militoj 18 milionoj da soldatoj pli ol dum la tuta antaŭa jarcento. Dum la mondmilito 1914-1918 mortis proksimume 17.000.000 da homoj, krome 18 ½ milionoj fariĝis invalidoj.

La plej sanga milito en la historio estis tiu de 1939-1945. Dum tiuj jaroj 23 milionoj estis mortigitaj kaj 34 milionoj vunditaj.

Kontraŭmilitisto

## LA „NEVIDEBLA“ KOLONIISMO

Ĝi ruinigas la sklavigitajn popolojn pli rapide ol la videbla.
En Pakistano la militelspezoj ampleksas ĉirkaŭ 50% la tuta budĝeto kaj en Tajland 48%.

## ORFOJ DE A-BOMBOJ RETROVAS VIVON

La Atombomboj, kiuj eksplodis super Hiroŝima kaj Nagasaki, kruele forrabis multajn gepatrojn de siaj infanoj. Tial laŭ instigo de prof.Nakano Seiiĉi ĉe la Hiroŝima-Universitato kaj lia edzino, ok orfoj fondis grupon „Ajumi“ (Paŝo) por reciproka helpo la 6-an de aŭgusto, la memortago la de la eksplodo super Hiroŝima.

Ĉiuj membroj travivi la malluman ombron. Sur la vizaĝoj ne vidiĝis gaja mieno kaj eĉ ne rideto. Gesinjoroj Nakana ĵuris, ke la orfoj ricevos la rideton. Ilia ĵuro efektiviĝis. Kompostisto Sekaŭa Akio, preskaŭ muta, proponis eldoni organon de la grupo. Kaj la unua numero de „Ajumi“ mimeografa aperis la 25. de oktobro lastjare. La nombro de la membroj rapide kreskis k. estas nun 80. En ĉiu tria sabato ili kunvenas. Kaj iliaj vizaĝoj estas nun serenaj.

La ordinara kunsidejo estas la domo de gesinjoroj Nakana. Tie en ĉiu tria sabato aŭdiaĝas la melodio de „La kanto de feliĉo“ de ilia forta kaj harmonia ĥoro. La profesoro diras, ke ilia amikeco kaj kunhelpeco montriĝas ne nur por amo al amikoj, sed ankaŭ amo al samsangaj parencoj. La sola malpermeso dum la kunsido estas: „ne paroli pri la pasintaĵo“. Ili ankaŭ klopodas forgesi la malĝojegan pasintecon.

Por esprimi sian dankon, la orfoj donacis bukedon da ruĝaj diantoj al s-ino Nakano Ĉitose. Sur rubando troiĝis surskribo: „Dankon, kara panjo! – De viaj filoj kaj filinoj“. Ili diris kun larmoj en la okuloj, ke la vorto „panjo“ varmigas iliajn korojn. Kaj „ni ĉiuj 10 jaroj neniam forgesis niajn panjojn. Nun s-ino ŝajnas esti vera patrino al ni.“

En la grupo Ajumi fondiĝis rondo de tabloteniso kaj basbalo. Ilia espero estas, ke ili havos „Domon de ripozo“. Intertempe ili revas pri sia plane kaj kantadas. Ili kloposas forskui de si la malgajan rememoron el pasinto.

Jui Ĉünoŝin
NAGOJA – Japanio

ANKORAŬ PRI RASISMO EN SUDAFRIKO

En la Durbano-konferenco de sudafrikaj kuracistoj oni sin okupis kun la demando, kiel malebligi, ke ĉe sangotransigoj negra sango enfluu en la venojn de blankaj pacientoj. La direktoro de la Johanesburga sango-transigejo, d-ro Ŝapiro decide malakceptis la leĝan ras-apartigon ĉe la sangodomoj kaj deklaris, ke la speciala markado de la boteloj kun negra sando estas science ne pravigebla. La prezidanto de la konferenco, d-ro Tomas, male konstatis, ke en la praktiko de la sango-preparaĵoj de blankaj kaj negraj personoj estas konservataj apartigite.

Kontraŭ la transigo de negra sango al blankarasuloj rigoraj instrukcioj estas faritaj. En multaj kazoj la parencoj de la pacientoj, ekzamenas detale, ĉu la ĉi rilataj instrukcioj estas obeataj. Negra sango povas esti transigata al blankuloj nur, se la paciento kun tio eksplicite konsentas.

Laŭ „LABORISTA GAZETO“
Vieno - Aŭstrio

## TUTMONDA VOKO

Esperanto kiel grandega lumturo
montras la direkton al paco kaj kulturo.

Lumigas la vojon al la estonteco
en kiu brilegos amo kaj frateco.

Ĝi estas la nova, forta fundamento
sur kiu sin bazas la vera homa sento.

Fundamento de la paco, luma epoko
en kiu por malamo ne estas loko.

Esperanto estas tutmonda neceso.
Ĝi estas ilo de ĉiu kprogreso.
Per ĝi kun volo, kredo kaj espero
ni atingos pacon sur la tero.

Nikola G.KOLAROV
KAZANLIK-Bulgario

Nazim Hikmet:

## J A P A N A F I Ŝ K A P I S T O

(viktimo de radioaktiveco el Bikini)

Vane la mano diligentas,
kiu ĝin tuŝas baldaŭ pentas.
Eĉ suno aŭ salo ne helpas
kontraŭ morbo, kiu jam palpas.

Fiŝon manĝi signifas morton.
Min me tuŝi signifas morton.
Ĉi ŝipo – nigra ĉerko, tombo,
Eniri ĝin alportas morbon.

Fiŝon manĝi signifas morton.
Ne tujan. Lanta karnoputro,
ŝanĝigi mem en en fiŝa nutro.
Fiŝon manĝi signifas morton.

Forgesu kara, viŝu larmon!
Ĉi ŝipo – nigra ĉerko, tombo,
eniri ĝin signifas morton.
Nin superflugis nigra ombro.

Forgesu kara, viŝu larmon!
Amo via donadis forton.
Sed mia kis` signifas morton.
Forgesu kara, viŝu larmon!

Ĉi ŝipo – nigra ĉerko, tombo.
Ĉie, ĉie nur morta maro.
Kie vi, kie, la homaro?

Esperantigis: Kata-kano.
Neologismoj: Morbo = terura malsano
Lanta = malrapida

\+ + + + + + + + + + +

## Reaperantoj

La germana militkrimulo Donitz, kiu nun forlasis la malliberejon, ricevas jaran pension de 20 mil germ.markoj. Li ricevas la pension retroaktive, Tio signifas, ĉar li estis 10 jarojn en malliberejo, nun li povas kvitanci 200.000 markojn. Kesselring, (la Italoj nomas lin „murdisto de garantiuloj“)

enspiras matenaerton en Okcidentgermanio, kie li estas ĉefo de la sabrokrakinta „Stahlhelm"-movado.

<u>EN LA SPUROJ DE HITLER</u>

Troviĝas laŭ la socialdemokrata organo „VORWARTS" en Okc.Germanio pli ol 100 organizaĵoj, kiuj estas adeptoj de la Hitler-ideologio.

<u>Raviteco</u>

El kineja reklam-anonco ni legas:
„TERURBILDOJ DE LA MILITO"
„LA PUBLIKO ESTIS RAVITA" - - -

V-a.

KUNHELPU DISVASTIGI LA MONDPACAN ESPERANTISTAN MOVADON !

## IOM PRI FILMOJ

Ĉe la IX-a internacia filmfestivalo en Karlovy Vary (Karlsbad) en Ĉeĥoslovakio, estis la franca filmo „Pri ĉiuj viroj de la mondo“ fascinanta stelo. Laŭ la unuanima opinio de la filmjuĝantaro tiu ĉi filmo plej bone respondis al la devizo de la festivalo: „Por bonaj rilatoj inter la homoj, por ĉiama amikeco inter la popoloj!“

Ĝia ideo estas simpla kaj nobla: se „la viroj en la tuta mondo“ unuiĝus, tiam ili povus plenumi multajn bonajn kaj utilajn taskojn.

Pro siaj meritoj tiu filmo ricevis la grandan premion de la IX-a internacia filmfestivalo.

+ + + + + +

Kiam la armiloj parolas, la leĝoj silentas. Tion spertis Leo Tolstoj, kiu estis devigita forlasi la naturan vivon en la kamparo por partopreni kiel oficiro militon en Krimeo. Li priskribis la malbenon de la milito en sia verko „Milito kaj paco“. Ĉi libro aperis en multajn lingvoj kaj ankaŭ en esperantistoj povas legi ĝin en la internacia lingvo. Nun oni tiun ĉi verkon filmigis.

La sceno ampleksas ne malpli ol ok naciojn: Anglion, Aŭstrion, Ĉeĥoslovakion, Francion, Germanion, Italion, Svedion kaj Usonon. En la batalscenoj ludas entute 11.000 viroj, 4.000 ĉevaloj, 200 kanonoj kaj 4.500 fusiloj. Ekster Romo estis konstruita aŭtentika miniaturo de malnova Moskvo, kiu alportis al Napoleono malvenkon. Tiu ĉi filmo kostis 7,000.000 dolarojn.

+ + + + + +

La atentema filmproduktanto F. Darryl Zanuck jam skribis kontrakton kun serĝento Mc Keon en la usona militfloto pri filmo en kiu Keon ludos sian propran kiel turmentanto de soldatoj La serĝento nome estis antaŭ nelonge kondamnita post sensacia proceso al naŭnomata punlaboro, tial ke li aranĝis noktan ekzercadon, kiu estis tiel kruela kaj senindulga, ke ses simplaj soldatoj mortis. La filmado komencos tuj post kiam la kondamnita soldatmortigisto liberiĝos.

## MALVARMA MILITO INFLUAS LA INTERNACIAN KOOPERATIVAN ALIANCON

En „PACO“ n-o.33 ni povas legi, ke la Internacia Kooperativa Alianco, kiu posedas organizojn en 38 landoj, la 7.8.56 pledis por internacia kunlaboro kaj reciproka fido inter la popoloj.

Tiu bona volo ne daŭris longe. Jam la 11.12.56 la Alianco akceptis en Parizo novan rezolucion, ĉi-foje en la spirito de la malvarma milito kaj direktita kontraŭ Sovjetio kaj ĝia militista agado en Hungario.

Ĉe la kunveno la reprezentantoj de Nederlanda, svisa, germana kaj amerikana kooperatiovoj deklaris, ke, se laŭstatute ne eblas eksigi la sovjetan kooperativan movadon el la Alianco, ili mem estus devigantaj eksiĝi.

Ĉar la kooperativa movado dum kapitalismo estas influigita de kapitalisma ideologio, tial ne mirigas, ke ŝiaj reprezentantoj estas indignitaj pro tio, ke la kapitalismo ne restariĝis en Hunagrio. Kaj pro simila partieco oni en sia rezolucio nek per unu vorto kondamnis la atakojn de Britio, Francio kaj Izraelio kontraŭ Egiptio (La rezolucio nur bonvenigis la retiron de la trupoj el Egiptio). Ĝi tute silentis pri la perfortaĵoj de la koloniistoj kontraŭ la popoloj de Alĝerio kaj Cipro. Kaj oni ankaŭ silentis kiam Usono dronigis ensango la liberecon de Gvatemalo.

Laŭdire la kooperativa movado estas politike neŭtrala kaj celas al sekurigo de la trankvila kaj paca laboro. Reale oni agas tute male. Anstataŭ forigi ĉion, kio malhelpas la internacian kunlaboron, oni helpas akrigi la internacian tension kaj tiamaniere vole nevole kontribuas al tiuj, kiuj intencas restarigi la faŝismon, kiuj kreas militsikozon kaj celas ekspolodigi novan mondmiliton.

La tempo de internacia maltensio estis mallonga. Tiel same en la Kooperativa Alianco. Sed tiu

tempo estis fruktodona kaj konstruanta. Dum la malvarma milito (kiu renaskiĝis) estas malbonfarema kaj malkonstruanta. La simplaj kooperativanoj spertis, ke ne utilas kulturi pomojn de malkonkordo, sed necesas aktivigi kaj efektivigi tion, al kio jam Robert Owen celis, nome krei sur nia komuna plando pacon kaj fruktodonan kunlaboron.

Tio devas esti ebla malgraŭ la ekzisto de diversaj konfesioj kaj filozifiaj konceptoj en la Alianco.

Kooperanto kaj MEM-an

## „T I Ě Ň   P H O N G“

La duonsemajna grandformata gazeto „Tiěň Phong (Avangardo), centra organo de la Vietnamia laborista junularo, kiu havas eldonkvanton de 10.000 ekz-oj publikis en sia n-o. de 20.11.56 pli ol kvaronpaĝan artikolon sub la titolo „Kio estas la internacia lingvo Esperanto?“ En ĉi artikolo nia k-do. Bao Anh Kha el Hanoi detale klarigas ĉi aferon kaj montras la altan valoron de Esperanto al la vietnama junularo. Cetere jam pluaj gazetoj favore raportas pri Esperanto kaj la rezultoj de tio jam montriĝas en diversaj lokoj de Vietnamo.

## D U   M I N I S T R O J  PREZIDAS LA ESPERANTO-MOVADON

Lastatempe la Vietnama sekcio de „MEM“ vigle laboris kaj atingis multajn sukcesojn. Ĝi estas aprobita de la registaro kaj havas kiel honorajn prezidantojn, ministron de klerigado kaj ministron de kulturo. Estis organizitaj prelegoj en pluraj mezgrandaj lernejoj kaj la movado ankaŭ ĝuas la aprobon de la junulara kaj studenta asocioj. Jam funkcias en Hanoi 5 kursoj kun ĉirkaŭ 400 gelernantoj. Ĝis nun pli ol 3.000 personoj ĉeestis la aranĝitajn prelegojn. Jam ni sukcesis eldoni vietnaman lerno-libron por Esperanto. Gejunuloj, kiuj partoprenos la VI. Festivalo en Moskvo diligente lernas Esp-on. Ni deziras multajn sukcesojn al ĉiuj esperantistaj pacamikoj kaj tre feliĉan novan jaron.

N.V.Kinh, HANOI

## ADRESŜANĜOJ DE NIAJ FUNKCIULOJ

Bonvolu peti, ke la MEM-sekretario, k-do. Anton BALAGUE, neplu loĝas Kirchenweg 12, Sankt Pölten, sed de nun (provizore): Poŝtkesto n-o 94 Sankt Pölten, Aŭstrio.

Nia MEM-peranto por Videtnam Dem.Respubliko, k-do. Nguyen Van KINH, 2 Ly Thúong Kiět, HANOI transloĝis por longa tempo al Moskvo, kie li havas gravan postenon. Lia nova adreso estas: k-do. Nguyen Van KINH, Ambasadorejo de Vietnama Dem.Resp. MOSKVA, Sovjet-Unio. Anstataŭperanto de MEM por Vietnamo nun estas: K-do Dao-Anh-KHA, Esperanto-Bás Nhan-Dan, HANOI, Vietnam.

## POLA SCIENCA REVUO PRI ESPERANTO

La pola scienca revuo „PROBLEMY“ n-o.12 el 1956 alportis preskaŭ tripaĝan raporton pri Esperanto k. ĝia literaturo, kun ilustraĵoj pri Esp-literaturo eldonita en Polio kaj monumentoj de d-ro. Zamenhof. La raporton verkis k-do. Czoslaw NOWICKI.

## „LA PACDEFENDANTO“

Tiu ĉi monata eldonaĵo de ĉeĥoslovakaj esp-pacamikoj ĉesis aperi. La kaŭzo estas en financaj mankoj kaj malhelpo flanke de oficialaj lokaj instancoj. Ĉiuj abonentoj, kiuj egaligis siajn jarabonoj por 1956, estas transdonitaj al Esp-klubo en Praha, kiu liveros al ili ek de januaro sian organon „BULTENO“. Ĝi enhavos specialajn raportojn pri la Esp-pacmovado. Eksterlandaj redakcioj kiuj kun ni interŝanĝas po kvante siajn eldonaĵojn, ricevos de nun anstataŭ L.P. ankaŭ la „BULTENO“. Individuaj abonantoj el eksterlande povas ĝin ankaŭ ricevi kontraŭ alsendo de samvalora literaturo. La korespondadreso estas: K-do. Jaroslav  Š u s t r ,  Dlouhá č.10, PRAHA-II, Ĉeĥoslovakio.

Tiu ĉi kunfandiĝo signifas ankaŭ firman unuiĝon de la Esperanto Movado en Ĉeĥoslovakio.

R.BURDA

## VIZITU LA BRAZILAN ESPERANTO-KONGRESON !

La brazila organizita Esperato movado, kiu fondiĝis la 21-an de julio 1907, festos en tiu ĉi jaro sian 50-jaran ekziston.
Krom aliaj gravaj aranĝoj ni organizas en la kadro de ĉi „ora jubileo" la XV-an Brazilan Kongreson de Esperanto, kiun ĉeestos reprezentantoj de la Respublika prezidanto, de ŝtatestroj+, ministroj kaj aliaj eminentaj personoj kaj institutoj, kiuj favoras nian movadon.
Ni ankaŭ kore invitas reprezentantojn de nia movado el aliaj landoj kaj estos feliĉaj vidi ilin inter la gastoj, kiuj honorigos nian kongreson per sia ĉeesto. Se vi nesukcesos persone alveni, sendu almenaŭ mesaĝon, kiun nin atingu la fine junio, por ke ni povu ĝin publikigi en niaj kaj nacilingvaj gazetoj. La Kongreso okazos de la 14-a ĝis 21-a julio 1957 en NITERÓI, Ŝtato Rio de Janeiro. Korespondadreso: Prezidanto de la XVa Kongreso de Brazilaj Esperantistoj, Caixa Postal n-o.10, NITERÓI, Estado de Rio, Brazilio.

Mario Ritter Munes
Prezidanto

## BONVENON AL NOVA KUNBATALANTO !

Sub la titolo „AL LA PACO" eldonas niaj italaj gek-doj neregulan bultenon por italaj Esp-pacdefendantoj. Ĝia unua numero aperis en januaro 1957 kun 8 multobligitaj paĝoj kaj multaj interesaj raportoj. La tekstoj estas bone redaktitaj kaj sen gramatikaj eraroj. La redakcio havis feliĉon povi jam en la unua n-ro konfirmi donacojn en sumo de naŭ mil unu cent it. liroj de entuziasmaj kunbatalantoj. Domaĝe la folioj estas nur unuflanke skribitaj, mankis raportoj, ĉar aliel tio signifus malŝparon de papero.

La plu regula eldonado grave dependas de multnombra varbendaj abonantoj, mondonacoj kaj alsendo de interesaj raportoj el ĉiuj landoj kaj speciale Italio. Adreso: k-do Dante CATTANEO, Via Paolo Giovio, 6 – M I L A N O , Italio.

## NI VELAS ANTAŬEN

Nia porpaca Esperantolaboro en USSR sukcese disvolviĝas. Tre multaj ĵurnaloj kaj gazetoj aperigis favorajn artikolon pri Esperanto. Multaj gejunuloj ellernadas la lingvon. Inter la aperintaj artikoloj oni notu tiun de nia k-do. J. Dalet en la n-ro 65 de la gazeto „Por defendo de la paco". Ĝi estas eldonata en multaj libroj.

B.TOLL
Leningrado

<u>En Estonio</u> nun lernas Esperanton 2.000 – 2.500 homoj en ĉ.50 grupoj. En la urbo Tallin troviĝas ĉ. 900 lernantoj. La Ŝtata Literatur-centro jam akceptis de ni manu-skriptojn de Esperanto-vortaroj kaj lernolibro kaj promesis eldoni ilin komence de tiu ĉi jaro. Instruistoj en diversaj lernejoj studas Esperanton. Pro granda intereso pri Esperanto multaj volas korespondadi, aparte pro la venonta Festivalo en Moskvo.

Arne MUNAK
Klilingi-Nomme

<u>En Moskvo</u> funkcias 10 Esperanto-rondetoj, el kiuj kvin en la Ŝtata Universitato.
<u>En Minsk,</u> Bjelorusio disvolviĝas laborista Esperanto-movado. Ni jam havas rondetojn en la Palaco de Pioniroj. Baldaŭ ni organizos rondetojn en la Politeknika Instituto kaj en la Palaco de Kulturo de Sindikatoj.
= = = = =

En „ GAZETO ROBOTNICZA“ n-o 199 de 956 aperis Esp-lingva artikolo de Julio Ozapo tradukita en polan lingvon kun la titolo „Per Esperanto mi ekkonis vian urbon“.

La artikolo unupaĝa estis notita kiel unu el la plej interesaj artikoloj, de ĉi eldono. La redaktoro Esp-lingve dankis al k-do.J.Csapo kaj petis pluan kunlaboron.

Sendu gratulojn al la redakcio: GAZETO ROBOTNICZA, Podvale 62, WROCLAW, Polio.

AKTIVECO EN GERMANA DEM.RESPUB.

Ke la poresperanta situacio iom post iom pliboniĝas, pruvas kaj kaŭzas la persista kaj intensa laboro de la aktivaj MEM-anoj en nia respubliko, kiuj ofte atakas la diversaj ministeriojn kaj eĉ la plej altajn instancojn per konvinkigaj leteroj. Kaj nia plej aktiva pacamiko, ĉefinstruisto k-do. Schödl en Neuruppin, rilate la Esperantoaferon preson viziti jam diversajn instancojn.

Mi mem skribis al la ministerio por popolklerigo, kiu i.a. respondis:

„En la kadro de la pacmovado certe ankaŭ la Germana Dem.Respubliko povas Esperanto-interesuloj partopreni studadon kaj uzadon de Esperanto kaj povas ĝin lerni. Ili ankaŭ povas korespondadi kun esperantistoj en eksterlando."

Esp-kursoj funkcias en diversaj lokoj, i.a. en Neuruppin, Radebeul, Freital, Dresden, Pirna kaj Wünschendorf. Ofte nur hazarde ni ekscias pri tiaj kursoj. Kelkaj anoj laboras modele por nia movado, aranĝante interlernejan korespondadon por akceli la mondpacon. Tia korespondado ofte okazas en la kadro de la lokaj packomitatoj. Por ĝi ni klopodas konvinki la pacamikojn pri la valoro de Esperanto.

Bedaŭrinde mankas al ni landa informilo kaj ni ankoraŭ ne scias kiam ni ricevos prespermeson por povi eldoni tian. Nun anoj, kiuj posedas skribmaŝinon, multobligas informojn kaj distribuas ilin inter esp-istoj, neŝparante tempon nek monon, nur por rapidigi la atingon de la fina venko. Por tiu celo ni ankaŭ petas helpon de ĉiulandaj pacesp-istoj, lernejoj, Esp-institutoj k.a.: Zentral-Komitee der Socialist. Einheitspartei Deutschlands, BERLIN, DDR., Ministerium für Kultur, BERLIN C 2, Molkenmarkt kaj Ministerium für Volksbildung, Wilhelmstr.68, BERLIN W 8. Nepre ne menciu en via letero, ke ni tion iniciatis al vi.

Franz TISCHER
Magdeburg-Buckau

NIA LETERKESTO

Respondo al s-ano Fr.Pecka, Brno:

Por atingi „modus vivendi" inter diverstendencaj pacdefendantoj necesas trovi komunan denominatoron. Kaj por sekurigi la pacon necesas kunlaboro ankaŭ sur la politika kampo. Kiel marksisto vi ja scias, ke jam V. I. Lenin formulis la principon pri paca kunvivado kaj kunlaborado inter la ŝtatoj de malsimilaj socialismoj. Tiu ĉi principo ankaŭ validas kiam temas pri unuopaj homoj. Ĉar, se ne eblus atingi kunlaboron, la neeviteble aperintaj problemoj akrigus la kontraŭecojn inter la homoj kaj tio ne akcelus la pacajn interrilatojn sed male, ĝi atencus ilin.

La tasko estas kunforĝi la plej vastajn rondojn, kiuj – sendepende de malsimilaj opinioj pri la solvo de unu aŭ alie konkreta internacia problemo – estas pretaj batali kontraŭ milito kaj por paco. Estas necese celi al konsekvenca aplikado de la pacamaj principoj en la internaciaj rilatoj.

Redakco de PACO

AVERTA EKZEMPLO

Militiniciatintoj devas pripensi ke bunkro de la Rokaj Montoj apenaŭ estas pli sekura ol estis la bunkro de Hitler en la germana ĉefurbo Berlino.

VORTO AL ĈEĤOSLOV.ABONANTOJ

La jarabono por „PACO"-1957 estas 20.-Kčs. Klopodu tuj pagi al nia peranto: F.LIČKA, Březí 12, OSTRAVA-Zábřeh.

## LA MILITMONSTRO NENIAM SATIGEBLA

Proverbo diras, ke ne eblas senhaŭtigi bovon trifoje. Sed kiam temas pri homoj, tio ŝajnas esti ebla. Makiavelaj oferpastoroj de la Militdio Marso per impostrabado ripetfoje senhaŭtigas la pacemaj popolamasojn. Kaj tiuj ĉi monsuĉantaj vampiroj postulas ĉiam pli. Jen kelkaj ekzemploj ol multaj:

S v e d i o : Reakciaj partioj kaj ĵurnaloj de tempo al tempo faras proponojn, ke Svedio havigu al si atombombojn. Kiel svedaj frenezuloj kun generalsteloj rezonas evidentiĝas el jena citaĵo en „Nova Militista Revuo“:

„Nova mondmilito en nia epoko certe neniigus nian civilizacion … En la nuna mondsituacio malpermeso kontraŭ la uzado de atom kaj hidrogenbomboj alportus konsiderindajn danĝerojn por la libera mondo.“

Troviĝas en la partioj de la grandfinanco kaj en la oficirkamarilo kaj multaj kiuj en siaj ĵurnaloj, radio kaj prelegoj ofte faras deviojn pri neŭtraleca politiko de la lando (kiu tamen estas pli formala ol reala). Freŝa ekzemplo pri tio:

La aŭtoritatoj malpermesis al la Monda Packonsilantaro aranĝi konferencon en novembro en Stokholmo (Tial ĝi devis okazi en Helsinki). Sed en marto ĉi-jare konferencos en la sveda ĉefurbo internacia kontraŭkomunista spion kaj detrimentist-organizaĵo.

Tia „neŭtraleca“ politiko certe ne servas la pacon kaj pacan kunekzistadon, sed per tia politiko oni donas mortigan baton al la neŭtraleco kaj helpas tiujn, kiuj sopiras militon, kontraŭrevolucion kaj enterigon de nia lando en militbklokojn de la okcidentajn landoj.

T h a j l a n d o : Post kiam Thajlando aliĝis al la agresema SEAT-bloko, ĝia armeo grandiĝis de 70.000 ĝis 180.000 soldatoj. 3.500 usonaj militeksportoj kaj instruktoroj zorgas pri la direktado en la armeo, polico, informaj aferoj kaj laboras en la generlastabo. La landaj militespezoj ege kreskis kaj faras nun pli ol la duonon de la ŝtata budĝedo. Konkrete 2.500 milionojn de *batoj*. Tio signifas, ke la impostoj ege altiĝas kaj la loĝantaro mizeriĝas.

T u r k i o : La militbudĝeto de Turkio atingos dum 1957 ne malpli ol 134 milionojn t.e. 30 procentoj de la tuta ŝtatbuĝeto. Kompare al 1956, la militaj elspezoj altiĝos kun 22 milionoj.

+ + + + +

Nuntempaj kavaliroj de „SEN TIMO KAJ RIPROĈ`“ estas bravaj kaj batalemaj kiel Rikardo Leonkoro la Tria, kiam preparas la trian mondmiliton, kiu dezertigus la tutan mondon, se la popolo ne batalus kontraŭ iliaj militplanoj. En la tempo de Rikardo, feliĉe por Anglio, feŭdaj baronoj mortbatis unu la alian en la „milito de rozoj“.

Pro Dio, kial la nuntempaj militemuloj ne imitas ĉi ekzemplen? Ili ja povus kolektiĝi en la Nevada dezerto por mortbati sin reciproke. Sed ili lasu la simplajn homojn vivi en paco kaj feliĉe!

Spartakus

## NE POR ILI

La Trigroŝopero (Dreigroschenoper) estus prezentata en la okcidentgermana urbo Lüneburg, kies urba teatro intencis enscenigi ĝin. La tuta plano estis nuliĝita, ĉar la urbaj reprezentantoj deklaris, ke la Brecht-weilla teatraĵo estas „politike nedezirinda“. En ĉi decido vidiĝas la Montrobastono de Goebels!

MartinMünzer

SONORIGU TRIFOJE !

La dana generalstabo estas lokita en malnova distingita domoen Kopenhago, kiu havas malnovtempan, latunormamitan pordegon, apud kiu pendas malnovega sonorilo kun frapilo kaj kvasto. Petolulo pendigis tien jenan anoncon sur la pordegon:
„Okaze de militekspolodo bonvolu signali tri foje per la sonorila frapilo!“

Kai Jensen

## UNUECO ESTAS FORTO

Negro, kiu tirigis bovojn, vidis kobron serpentunanta sur arbo. Li ekprenis sian longan vipon kaj per unu bato ili frakasis la kapon de la serpento. Mallongan distancon de tie li lerte ripetis la saman manovron kun bovomuŝo, kiu sidis sur arbo-stumpo. Lia celtrafeco kaŭzis, ke post kelkaj minutoj arvikolo perdis la kapon.

Blankulo, kiu akompanis la negron, ne povis ne diri:

„Jen vespujo. Provu trafi ankaŭ ĝin!"

La negro ridetis kaj respondis:

„Ne! Tion mi ne kuraĝas, ĉar la vespoj estas organizitaj."

Kaj jen *sens-moral*: Kial la imperialistoj ne sukcesis efektivigi siajn planojn en Egiptio kaj Hungario? Antaŭ ĉio pro tio, ke la pacfortoj estas sufiĉe organizitaj por povi bridi la aventuristojn, kiuj deziras ĵeti la popolojn en suferojn kaj mizeron de nova milito. Sed la popoloj devas akrigi sian atentemon kontraŭ la imperialistaj agresoroj kaj decideme disvolvi la batalon por la paco. Sendube la pacfortoj iĝos pli fortaj k. pli organizitaj dum 1957, kaj tio grave plibonigos la internacian situacion.

„No passaran"

## SERVADO AL LA HOMOJ

La kapucena monaĥo kaj iama deputito en la franca parlamento, kiu dediĉis siajn deputitenspezojn al la viktimoj de la nuntempa misordo, abato Pierre, diris prave:

„La liberecon ni savis nur teorie. Ni estas en danĝero, esti savintaj nur kadavron. La homoj en la nesufiĉe progresintaj landoj preferas manĝi kun la komunistoj ol kun nia libereco morti pro malsato. De unu kaj duona miliardoj da homoj en tiuj landoj dependas la onteco de ni ĉiuj, ne de la problemo Oriento-Okcidento! - Ĉiuj, tiuj homoj simple malsatas!

D-ro.A.HALBEDL

## NEGROŜTATO FARIĜAS SENDEPENDA

Ora Bordo, aŭ Ghana, kiel ĝia nova nomo estas, situas en okcidenta Afriko. Ĝia loĝantaro nombras pli ol 4 kaj ½ milionojn. La lando dum longa tempo estis objekto de kolonia elsuĉado. Sed post la dua mondmilitoĝia situacio ŝanĝiĝis. Pro la influo de la nacia liberiga movado la brita registaro jam en 1951 devis agnoski la registaron de afrikanoj, fonditan en Ora Bordo.

Oficiale tiu lando ankoraŭ estas kolonio. Tial la loĝantaro daŭrigas sian batalon por la sendependeco kaj atendas, ke la angla registaro donos laŭ promeso, al Ora Bordo ŝtatan suverenecon en la jaro 1957. Tio signifos, ke Ora Bordo estos la unua sendependa negrostato. Tiu fakto esprimos sendube la larĝaniman politikon de Grandbritanio, kiu jam montriĝis en Hindio, Burmio kaj Sudano.

Nuntempe la tuta Ora Bordo troviĝas en bolanta evoluo. Ĉie estas konstruataj lernejoj, hospitaloj kaj socialaj institutoj de publika bono. Sed restas ankoraŭ tre multe por fari. La plej granda parto de la loĝantaro estas ankoraŭ analfabetoj. En la lando oni parolas preskaŭ cent dialektojn. Oni ankoraŭ ne venkis la tropikmalsanojn malarion, disentrerion kaj ĥoleron.

A.TURNER

## VORTOJ POR MEMORI

….. la homoj estas kapablaj fari agajn streĉadojn koncerne al militado, por kaŭzi morton kaj detruojn. La elspezoj dum nur unu monato de la lasta mondmilito sufiĉus por irigacii kaj fekundigi tutan Saharon kaj tiamaniere nutri amasojn da homoj, kiuj nun devas morti pro malsato.

J.CURIE

LUMA ESTONTECO

Rapide detruiĝas la malnova epok`
konstruita sur la fundamento de malpac`.
Novaj tempoj trovas en la vivo lok`,
Tempoj de justeco, vero, amo kaj pac`.
La nova tempo konstruas luman altar`
sur la ruinaĵoj de la maljusta mond`.
Esperanto – jen la vojo de la homar`,
kiu kondukas al granda familia rond`.
La lingvo Esperanto – jen nova nom`
de la vivo, en kiu progresas la ver`.
Ĉiu homa kor` estos de la vero dom`
Ekregos unu lingvo sur tuta la ter`.

N.G.KOLAROV
KAZANLIK – Bulgario

ŜATU ĈIUJ ROZOJN …

Ho, nobla rozo,
vin poezio, prozo
kaj ĉiuj arto
priskribas, laŭte laŭdas,
ne zorgas pri l` bonfarto.

Foje ja aŭdas
kvazaŭ pri sorĉo oni,
ke ie devas
roz`malblanka florburĝoni.
Multaj envie krevas.

Rozo superas,
same homo fieras.
Ĉu ne mankoj
se en monda ĝardeno
povus flori nur blankaj?

Do, ek al streĉo
por homa feliĉ`, paco.
Valoras strason
vivo, dum trotas boto
kelkajn rozoj je koto.

Kata-kano

GRENLANDANOJ – NOVAJ HOMOJ

La nomo grenlando kaj Eskimo havas sian propran historion. Sed ĉi tie sufiĉas diri, ke la grenlandanoj antaŭ ĉirkaŭ 1.000 jaroj enmigris Grenlandon el la regionoj de Hudson-golfo. La Eskimioj nomas sin mem „innuit“ (pluralformo de „inuk“) t.estas „homoj“. Oni povas diri, ke ili meritas ĉi titolon, ĉar eĉ se ilila karaktero havas multajn primitivajn trajtojn (samkiel ilia lingvo), ili laŭnatura estas tre pacamaj kaj gastamaj.

Sed pro izoleco, medio kaj vivkondiĉojn la kulturo nur malrapide gajnas terenon sur Grenlando. Ankoraŭ la legoscio tute ne estas centprocenta. Nuntempe la eskimoj tamen ĝenerale vizitas la lernejon en klasoj de ĉiu dia tago. Sed nejunaj kaj maljunaj eskimo estas en granda amplekso plej parte analfabetoj kaj tial estas la legantarnombro de grenlandaj gazetoj tre limigita. (Troviĝas nur du gazetoj en Grenlando.)

De tempo al tempo estas ankaŭ libroj presataj en Grenlando. Laŭnombro ili ne estas multaj kaj la eldonkvanto ne granda. Sed la eskimoj estas tre interesataj pri tio, kion la blankulo pensas, opinias k. faras. La pli forta disvastigado de legoscio pere de lernejoj kaj la aktiva intereso de la junularo por tio, kio okaziĝas sur „ilia“ insulo antaŭsignas novan epokon por Grenlando. Malrapide sed certe la civilizo metas sian stampon sur la vivadon kaj faradon de la grenlandanoj. Eble post ne tro longa tempo grenlandaj poetoj prikantos en Esperanto siajn sentojn kaj etosojn, ĉar artaj, poetikaj esprimiloj ne mankas al ili. Jam troviĝas ne malmultaj grenlandaj versaĵoj tradukitaj en dana lingvo. Kaj en la tradukita k. originala poemaro „ROZOJ KAJ URTIKOJ“ de Poul Thorsen (MEM-ano) estas prezentita en Esp-o ankaŭ grenlanda poezio de ok eskimaj aŭtoroj.

Ergo

PERSISTO ALPORTAS SUKCESON

Admiron meritas la persista laboro de niaj gek-doj en la Germana Dem. Respubliko por trabatali legalecon al la esperantista pacmovado. Specialan meriton havas nia k-do. C. Kessler en Dresden. Li komencis eldoni maŝinskribitan „Informilon“ en germana lingvo pere de kiu li komunikas la plej gravajn raportojn al la esperantistoj troviĝantaj en diversaj lokoj de la respubliko. Ĝi estas la unua kontaktilo, kiu kunligas la izolulojn kaj donas direktivojn por komuna agado. Per ĝi li kolektas la esp-istojn al pli posta organizita laboro. Nun oni de ĉiuj flankoj letere atakas oficialajn instancojn por akiri permeson sin organizi kaj eldoni gazeton. Partaj sukcesoj jam evidentiĝas:
En Radebeul funkcias kurso por komencantoj kun 15 personoj kaj en fundamenta lernejo aliĝis 20 infanoj. La direktoro de la lernejo aprobas la instruadon. Tuta dancgrupo de loka ŝuofabrikejo, kiu ĉeestos la Junularan Festivalon en Moskvo nepre volas regi ĝis tiu tempo Esperanton. En Freital ap. Dresden aliĝis pli o 100 infanoj por lerni Esperanton.
En Karl-Marx-Stadt okaziĝas regule ĉiun duan semajnon renkontiĝoj de Esp-pacamiko (MEM-anoj). En la ferfabriko Hettstodt funkcias Esp-rondeto en la sindik. klubejo. En la Uzino de Karl Liebknecht gvidas kurson k-do. Rozner. Pluaj kursoj funkcias ĉe k-do Gerhardt en Wünschendorf kaj ĉe studiokonsilanto P.Glöckner en Pirna ktp. Estas planita landa esperantista renkontiĝo dum paskotagoj la 20.4.57 en gastejo „ELBTERASSE“ en Riesa/Elbe.
Antikvaristo Gerh.Bittner en Dresden, N.10, Wilh.-Külz-Str. 17 rezervas de tempo al tempo malnovajn lernolibrojn kaj literaturon. Tie eblas peti mendoliston. K-do. W. Ranft, Radebeul, Freiligrathstr. 4. Ventas poŝkartojn kun portreto de Lenin kaj Maŭ-Tse-Tung kaj ties deklaroj pri Esperanto.
En Dresden unune post ok jaroj estis aranĝita Zamenhof-vespero la 15.12.56 kun granda sukceso. Tiaj aranĝoj povas okazi, se oni petas permeson ĉe la polico. Jam eldoniĝis en formo de letero la dua“Informilo“. Interesuloj kaj gek-doj, kiuj emas kunlabori volu sin anonci ĉe:
K-do.Curt KESSLER, provizora Esp-centro, DRESDEN-Klotzsche, Kieler Str.28 /*Poŝtĉeka* konto: Dresden-733 35

KULTURA MEMORANDO

D-ro. BEIER Sándor en urbo Cluj sendis memorandon rilate Esperanton al la prezidanto de la Rumana Popola Respubliko dr. Petru GROZA, al la Centra Partia Komitato en Bukaresto, al la ministerioj por instruado kaj kulturo kaj ankoraŭ al 21 aliaj altaj instancoj. En la memorando li klarigas la altan valoron de Esp-o kaj la rolon, kiun ĝi jam ludas en la internaciaj rilatoj kaj en la monda pacmovado. Fine de tiu ĉi memorando li starigas praktikaj proponojn por krei ankaŭ en Rumanio oficialan esperantistan pacmovadon kaj eldoni esperant-lingvan rumanan literaturon. Ĉiuj tiuj instancoj estas petataj doni oficialan respondon. Rumanaj gek-doj sin turnu por detalaj informoj kaj kunlaboro rekte al D-ro.BEIER Sándor, Salcim 12, CLUJ. Ne forgesu aldoni p.m. por respondo.

QUOC TĔ NGÜ
ESPERANTO

Tiéng Nól Của Hó Binh Vá Hŭu Nghi estas la vietnama titolo de 4-paĝa prospekto en kiu nia k-do. Dáo Anh KHA informas la vietnaman publikon pri la valoro de Esp-o.
Koresp.adreso: k-do. Dáo Anh KHA, Esperanto, Bas Nhän-Dän, HANOI, Vietnamo.

GEKAMARADOJ! NE FORGESU TUJ REABONI „PACON“. Por eldoni necesas mono-mono-mono!

## PARTOPRENU INTERNAC. KONKURSON

Por pli interesigi la vivon de niaj junaj pioniroj kaj eduki ilin al internacia amikeco, nia Domo de Junaj Pioniroj en urbo Pirna (DDR) aranĝas de 1-a januaro ĝis 15-a de aprilo 1957 INTERNACIAN „MALPROKSIM"KONKURSON por evoluigi novajn specojn de manverkado. Al tiu konkurso ni invitas ĉiujn ekterlandajn pionirojn, grupojn, edukistojn k. kromlernejajn institutojn.

Prijuĝataj estos ĉiuj ricevotaj novevoluigitaj manverkaĵoj kiujn infanoj povas fari dum 1-6 laborhoroj. Ni petas, ke vi sendu al ni pri ĉiu projekto skizo kaj laborraporton. La raporto devas diri, kia materialo estas uzita, por kiom aĝa infano la laboro estas destinita kaj kia labortempo necesa por ĝia produktado. Laŭeble sendu la pretan laboraĵon (se vi deziros ni post la uzo resendos ĝin).

La plej bonajn projektojn k. laboraĵojn ni elektos kaj kunigos en katalogo. Ĉiuj konkursantoj ricevos ĉi katalogon kiel dankesprimon por kontribuaĵo. La plej bonajn laborojn ni distingos per medaloj. La senditaj laboraĵoj estos ekspoziciitaj dum Internacia Infantago-1957 en la Pionirdomo de Maksim Gorki.

Ni forte esperas ke ĉiuj landoj partoprenos ĉi internacian konkurson, *kies* celo estas, kontribui al amikeco, paco kaj Esperanto. Nia adreso:
DOMO DE JUNAJ PIONIROJ „MAXIM GORKI", Gen.Kirner, An der Gottleuba 1, PIRNA, Germanio-D.D.R.

## GEKAMARADOJ EN D.D.R. ATENTU

K-do.Franz TISCHER, Martinstr.9, MAGDEBURG-BUCKAU, Germanio-DDR sukcesis eldoni presitan flugfolion pri tio, ke Esperanto ne estas malpermesata en D.D.R.

La flugfolion eblas uzi en ĉiu loko kiel trafan varbprospekton, por germanlingvanoj. Mendu ĝin ĉe supre citita k-do. Nia redakcio ne scias la prezon. Ne forgesu aldon respond. p.m.

VARBU NOVAJN ABONANTOJN POR „ P A C O „

## EN DAMASKO

same kiel en tuta Sirio estas unua foje en ĝia historio enkondukita ĝenerala, deviga lernejinstruado.

N.T.

## AŬSKULTU RADION ROMAN !

La elsendoj okazas regule ĉiu marde, merkrede kaj vendrede de 18.55 ĝis 19.10 horo mezeŭropa tempo sur la ondoj 30.90 metroj, 41.24 metroj kaj 50.34 metroj.

Nepre post la aŭskulto skribu al la Radio-stacio viajn impresojn k. dezirojn. Jen la adreso:
RADIO-ROMA, Esperanto Fako, Casella *postale* 320, R o m a , Italio.

## ĈU ESTAS VERE, KE …..?

Sub tiu ĉi titolo „Paco" publikigas novan rubrikon, kies celo estos respondi al informoj de la gazetaro kaj radioelsendoj, ofte malfidindaj, dank` al helpo de la esperantistoj mem.
Ekzemple, francaj gazetoj asertis, ke iu pola fervojistino havas salajron de 500 zlotoj monate kaj ke tio prezentas la valoron de malbona paro da ŝuoj.

Ĉu vere aŭ ne? Ne sufiĉas krii „Mensogo!" Multaj homoj sin demandas, kie troviĝas la vero, ĝis kia grado estas troigo, ĉar ili ne povas kontroli tian aserton. Dank` al nia rubriko, polaj esperantistoj mem povas doni ĝustan respondon.

Vera pacamanto amas la veron. La batalo por paco estas ankaŭ batalo por vero. Dank` al Esperanto kaj dank` al ĝia internacia disvastiĝo „Paco" estas la sola organo, kiu – interalie – povas servi kiel ponto inter t.n.orientaj kaj okcidentaj landoj. Dank` al nia rubriko, demandoj kaj respondoj flugos tra la landlimoj, lumo forigos mallumon, vero mensogon. Povas okazi, ke iuj respondoj kontraŭos sin reciproke kaj ne estos konvinkigaj. La redakcio ne intermiksiĝos, ĝi nur publikigos fidele la ricevitajn tekstojn kaj la legantoj mem prijuĝu. Dependas de ili, ke tiu rubriko fariĝu regula, interesa k. utila al la tutmonda paco.

Jen estas la regularo de nia nova servo:
1./ Demandoj:
Ĉiu leganto de „PACO“ povas sendi unu aŭ plurajn demandojn. Ĉiu demando estu konciza kaj preciza kaj koncernu nur unu aferon. Principe ĝi ne entenu pli ol 40 vortoj, krom en esceptaj kazoj.
Ĉiu demando estos akceptata nur se la aŭtoro indikos sian precizan adreson kaj la fonto de sia informo (nomo de gazeto, libro, kunveno, prelegintо ktp) kaj se temos pri preciza fakto aŭ okazintaĵo. Diskutadoj pri politikaj aŭ similaj opinioj ne estas dezirataj. Nomon kaj adreson de la aŭtoroj ni ne publikigos, se ili tion deziros.
2./ Respondoj:
La kondiĉoj estas la samaj kiel por la demandoj. Respondoj tamen povos enteni ĝis 100 vortojn. Ĉiu leganto povos respondi al pluraj demandoj. Ĉiu demando povos ricevi plurajn respondojn, eĉ se ili estos inter si tute kontraŭaj.
3./ Ĝeneralaj principoj:
La redakcio respondecos nek pri la demandoj, nek pri la respondoj. Interŝanĝo de politikaj aŭ aliaj konceptoj estos nedezirata. Nur precizaj faktoj estu pritraktotaj. Komentoj estos forigitaj, se ili ne estos nepre necesaj por la kompreno de la koncernataj okazintaĵoj. Insultoj nepre kondukos la tutan dokumenton en paperkorbon. Objektiveco, amo kaj vero estu la kvalitoj de ĉiu kunlaboranto!
Se iu kunlaboranto volus senpere korespondi kun alia, kies adreso ne estas publikigita, li povas skribi al la respondeculo de tiu rubriko, kunsendante 2 internaciajn resp. kuponojn aŭ egalan valoron. La petita adreso estos sendata nur post konsento de la koncerna s-ano.
En esceptaj kazoj, se ne pruviĝus, ke iu persono volonte kaj intence prezentas mensongajn demandojn aŭ respondojn, la landa MEM-peranto estus informita kaj farus enketon kies sekvoj dependus de la respondecoj de MEM.
Kaj nun, karaj gelegantoj, ni atendas viajn demandojn! Skribu senpere al la respondeculo de „Ĉu estas vere, ke ...“
K-do. W.Gilbert, 44 rue Kléber, FLEURY-les-AUBRAIS (Loiret), Francio.

## R E C E N Z O J

„PROMETEO“, trimonata sendependa sub redakto de septembra komitato en OSAKA, Nakacu hamadoori 2-20, Oojodo-ku, Japan. Abono: 12 int.resp.kuponojn. Jam aperis la dua numero.
Jen nova kunbatalanto kun specialaj taskoj: plivigligo de la Esp-movado en Japanio (Oriento) kaj kultura kunakcelado sur fundamento de tutmonda paco. Intence flanka, tre aprobinda: diskonigi la facetojn de la japana homo, landaro kaj historio.
Prometeo en la mitilogio estas simbolo de genia kaj malhumila homo. Mi deziras, ke nia kore salutata „PROMETEO“ evitu tiun sorton de sia modelo aŭ almenaŭ finfine renkontu sian Heraklon liberigontan.
„ESPERANTO-MISIONEN“, protestanta periodaĵo kun ĉiam legindaj tekstoj en modela Esperanto.
„LA NAVIGANTOJ“, klariga faldbroŝureto sur tre bona papero kun bela preso kaj modela Esperanto kiu plaĉe konigas la varbmetodon de la apostolo Paŭlo, skizon pri la historio kaj konstruitecon de la samnoma organizaĵo.

D-ro.A.HALBEDL

## PENSOJ PRI „RECENZO“

La bonintenca recenzisto dro.Halbedl estas „firme, ke la ĉefa tasko de Esperanto ne estas literatura“. („PACO“ n-o. 34-35.)
Tamen, efektive ĝi „ĉefe“ estas literatura (skribe kaj lege uzata lingvo). Tial d-ro. Halbedl malpravas en sia recenzo pri „EZOPA SAĜO“ en kiu li denove montras bedaŭrindajn antaŭjuĝojn kontraŭ t.n. novvortoj.. Zamenhof mem ja parolis pri „... neologismoj, kiuj nenion ŝanĝante prezentas por la lingvo nenian danĝeron“. (Revuo 1906/07, pĝ. 386) Kaj ke „tiel same, kiel mi nun prezentas serion da neologismoj, tiel same ankaŭ ĉiuj ailaj esp-istoj povas proponi ...“ (la letero al Boirac, 1906)

Veneno (vorto uzita de d-ro. Halbedl, rilate al verkoj kun neologismoj) do estas la „recenzo“ mem. Ĉar ĝi malrekomendas la eminentan verkon „EZOPA SAĜO“, per kiu ĉiu esperantisto povas lingve progresi kaj ampleksigi sian vortprovizon pri poezio.
Laŭ la recenzisto mankas al la legantoj kondiĉoj por povi ĝin kompreni. Sed, ĉar la homa, homara spirito kaj en oriento kaj en okcidento, kaj en scienco kaj en arta formo (kiel en tiu ĉi verko de Kalocsay), lumas „kaj lumos plu ne estingeble“ (pĝ. 23 en nomita libro), tial vera recenzo devus esti finita per la rekomendo:
La libron „EZOPA SAĜO“ aĉetu, legu kaj observe pripensu!

Mogens Groth

## HUMORO KAJ SATIRO

Okazis granda propagandkunveno en Teksas. La parolanto estis en ekstazo kiam li diris:
„ - neniam fremdaj invadintoj venkis nian nacion kaj popolon.“
Subite aŭdiĝis ridego, kiu embarasigis la entuziasmigitan publikon. Montriĝis, ke indiano de tribo „Nigra Pantero“ sekrete forkuris el sia rezervejo kaj ŝtele sin kaŝis sub la lasta benko. Li estis elĵetita pro malordo.

V.

## KAJ DORMAS ESTONTAJ VIKTIMOJ !

Kvar kuzoj post klika batalo
fariĝis kvar eminentuloj:
ministro, prelat`, generalo,
kanonfabrikant` … sen skrupuloj.

Nun ludas la nobla kvarteto
tre ruze en plenharmonio
per sumoj el ŝtata budĝeto
profite a*l `p*ropra unio.

Pro blufoj: „Defendu Liberon!“
„Por Paco, Kulturo, Landlimoj!“
ne vidas mortigan danĝeron
hipnote estontaj viktimoj!

Josef BURGER Originale de: *Saarlando*

## D I O K A J M I !

Jen – kiam mi kun Dio luktis:
parolis li kun pli da mildo,
post kiam firme mi deklaris:
„Vi kreis min laŭ Via Bildo!“

Respondis poste li serene:
Celtrafis via argumento!
Momente estis mi ŝokita,
parolas vi sen komplimento!

Ne estas vi normal-filistro
kun servutema norm-animo,
pri multo pensas vi alie
kaj diras ankaŭ ĝin sen timo!

Pro tio, ke nun ne komprenas
tre mulatj vian viv-laboron,
favore kreis mi kompense
en vi konstatan bonhumoron!

Vi - spite ĉion - restas gaja
kaj kontraŭ krednebul` imuna,
kontenta igas vin strebado
al homfeliĉo – sed komuna!“
Li adiaŭis min amike,
ho kiel li ankoraŭ ridis,
dum min ĝentile „Sankta Petro“
ĝis la ĉiela pordo gvidis.

Josef BURGER Originale de: *Saarlando*

## M I A P A T R I N O !

Bona mia Panjo estis!
Naŭ infanoj amis ŝi.
Mankis pano, tamen restis
hejmintima harmoni`
dank` al bonpatrina koro!

Mia bona patrineto
nun forestas longe jam,
tamen ŝia vivportreto,
ŝia patrineca am`
restos danke` en memoro!

Josef BURGER Originale de: *Saarlando*

Rim.de red.: Jen ekzemplo de simpla proleta poeto, al kiu sufiĉas simplaj esperantaj vortoj de d-ro.Zamenhof por v verki nesimilajn poemojn, facile kompreneblajn al ĉiu. Kial do por aliaj ne sufiaĉas novvortojn. Kial enkonduki ĉiam novvortojn?

„MEM“ bezonas por gazeteldono monon,
Ne forgesu renovigi ĉe via landa peranto vian jarabon!!

LANDAJ PERANTOJ DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

Niaj perantoj akceptas jarabonojn por nia centra organo „PACO“. De la perantoj vi povas peti informojn, se vi aldonas por respondo l` intern. rep. kuponon.

ALBANIO: Janko PALI, Quero, HIMARA, Albanio.
AŬSTRALIO: Steve BENNET, Flat 3, 6 Brighton Aven. Croydon Park, N.S.W., Aŭstralio. (25 ŝil.)
AŬSTRIO: Franz WAGNER, Reimundstr. 37, LINZ, Post 10. (25 ŝ.)
BELGIO: Fr. DEBAENE, 25 Av.des Naiades, WATERMAL-BOITSFORT (50bf)
BRITIO: Brita Esperantista Packomitato, 15 Twisden Road, Highgate Road, LONDON N.W.5, (6 a.ŝ.)
BULGARIO: Bulgara Esperantista Asocio, P.K.66, SOFIA. (10 lev.)
ĈEĤOSLOVAKIO: František LIČKA, Březí 12, OSTRAVA-Zábřeh. (20 Kčs)
DANLANDO: Tilly NIELSEN, Kompedal lejren pr.Engeswand, Bar.3, stue 8. Jutlando. (7kr.)
FRANCIO: Claude BLANC, 45bis rue Jeanne d`Arc, LYON-3e. (300 ff.)
FINNLANDO: Paavo HEIKKINEN, Apollonkatu 4a, HELSINKI-5. (300 m)
GERMANIO-DDR: Helmut LOFFLER, Theaterstr.1, MITTWIDA/Sa. (6 m)
GERMANIO-DBR: MICHALSKI, Haeselerstr.1, BERLIN-Charlottenburg, (4 mk.)
HUNGARIO: Pál BALKÁNYI, Posthidgkút, Haraszt u.33, BUDAPEST-II. (20 for.)
INDONEZIO: Kho Khwat Liat, Gang Mandor No.7, DJAKARTA. (?)
ISLANDO: Oskar INGIMARSSON, Langholtsvegi 3, REYKJAVÍK. (25Kr.)
ITALIO: A.OPISSO, Via Assarotti 10 GENOVA-125 (800 L.)
JAPANIO: NANBA Syozi ĉe Kansai Ligo de Esperanto Grupoj, Nakacuhamadoori 2-200, Oojodo-ku, OSAKA. (250 jen.)
JUGOSLAVIO: R.PORTNER, Papukgore ul.26 A.OSIJEK-VI (300d)
NEDERLANDO: Cor de WAART, Plancinsstraat 71, AMSTERDAM-C. (4.50G)
NORVEGIO: N.NIELSEN, JUDABORD (6k.)
NOV-ZELANDO: P.WILIAMS, 26 Trafalgar, TIMIRU, (1 ŝil.)
POLIO: Asocio de Esperantistoj en Pollando, Kozia 3, WARSZAWA, (25 zl.)
RUMANIO: Nita VRINCENAU, Piata Republicei 13, MEDIAS.
SVEDIO: Karl KVIST, Box 109 A.DEJE. (6 kr.)
SVISIO: Maria GRÜNING, Sahlistr, No.57, BERN (5 sv.fr.)
USONO: ĉe la peranto de Britio.
SOVJET-UNIO: Boris TOLL, Lesnoj pr.20, kv.98, LENINGRAD-175 (10r)
VIETNAMO: Däo Anh KHA, Esperanto, Bás Nhän Dän, HANOI
ALIAJ LANDOJ: rekte ĉe MEM-sekr. Anton BALAGUE, Postfach 94, SANKT POLTEN, Aŭstrio. (10 i.r.k.)

Ni plu serĉas ankoraŭ perantojn en landoj kiuj ankoraŭ ne estas ĉi tie reprezentitaj. Bonvolu aliĝi ĉe MEM-sekretario: Anton BALAGUE, Postfach 94, SANKT POLTEN, Aŭstrio.
(Rimarko: La ciferoj inter la krampoj signifas abonkotizon al „PACO“ por la koncerna lando.)

ADRESOJ DE La „MEM“-SEKRETARIEJO:

Ĝen.sekretario: Anton BALAGUE, Postfach 94, SANKT POLTEN, Aŭstrio
Vicsekretario: Karl KVIST, Box 109 A.DEJE
CENTER REDAKTORO de PACO: Gösta Holmkvis, Rönneholmsvágon 55, tr.2, MALMO, Svedio.
Prezidanto de MEM: Rudolf BURDA, Palackého nám.6, Plzeň Ĉeĥoslov.
Por kontakti kun la supre cititaj funkciuloj necesa ĉiam aldoni almenaŭ 1.intern.resp.kuponon, se vi deziras ricevi respondon.

## EL LA SEKRETARIEJO DE „MEM“

Dank` la perantoj kaj entzuziasmaj aktivuloj de MEM, ni povas fiere informi, ke ni superis la celon de la 3-a konkurvarbado je 300 abonantoj. Je la fino de 1956 estis 400 abonantoj pli ol ni celis por tiu konkurvarbado, kiu finiĝis la 30an 6.1956.

Efektive ni povus havi multe pli da abonantoj, sed nia eldonsistemo ne permesas liveri pli da ekz-oj al iu lando ol tiu kapablas per propra eldono de PACO liveri al MEM. Ekzemple Hungario, Sovjetio, Ĉeĥoslovakio k.a. povus havi duoblan nombron da abonantoj, sed ne kapablas rekompenci.

K O R E S P O N D I   D E Z I R A S

Korespondanoncojn pagu kaj mendu ĉe via landa MEM-peranto. Landoj, kie ankoraŭ ne estas peranto mendu rekte ĉe nia centra redaktoro: Gösta Holmkvis, Rönneholmsvágen 55, tr.2, M A L M O , Svedio. Devo de ĉiu anoncanto estas, almenaŭ unufoje per il.p.k. respondi al ĉiu korespond-petanto. Se vi mem ne sufiĉus, transdonu al konatulo.

K-do. Mikaelo PRAVDIN, KUJBIŜEV obl. Poŝtamt, poŝtrestante, Sovjetunio. Aspiranto de pedagogia instituto, profesio lingvoscienco, pri arto, pentroarto, filozofio k. tekniko.
K-dino. Růžena MAREŠOVÁ, instruist., ŽAMBERK 642, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj, při muziko. Interŝ.il.p.k. kaj gazetojn.
K-do. Ivan HADĜIISKI, S.RIJENA, ok. Kazanliska, Bulgario. Kun ĉ.landoj.
K-do. Stasys KAZLAUSKAS, Melnikaites 48-1, VILNIUS-5, Litova, SSR. Mi estas esp-isto de 1912 kaj soifas raportojn pri Esp-movado el tuta mondo. Mi dez. kor. pri ĉiu temo.
ESPERANTO-RONDO, Van Cöng Nhän Dän HANOI, Vietnam, popolartista kolektivo dez.kor.pri muziko, kanto k. danco kun ĉ. landaj jun. kolektivoj partoprenantaj la Festivalon de la monda junularo en Moskvo.
K-do. E.Lykke NIELSEN, Bispevaenget N-o.6, *HJORRIN*G, Dannmarko, dez.inter ŝanĝi ord.m.p. kun ĉ. landoj.
K-do. Ole NEDERLAND, Svanevej n-o 3 ODENSE, Danmarko, serĉas por 20 ge-knaboj inter 12-15 jar. interŝanĝadon de divers. interesaĵoj kun samaĝuloj.
K-dino. Velička T. NIKOLOVA, Str.Vidini *Kuli 14*, SOPFIA, Bulgario, kun ĉ. landoj per let. kaj. il.p.k. Inter-ŝanĝas ĵurnalojn.
K-do. Vilém VANTUCH, Ul. L. Ševčíka č.17, OSTRAVA-XX, kun ĉ. landoj per let., interŝ. il.p.k. kaj p.m.
K-do. Inĝ. LIU Zyn, 9 Yukung Chieh, Tiehsi Chü, MUKDEN, Ĉinio-China, kun ĉiulandaj geinĝeneroj pri teknik. problemoj, desegnado kaj fabrikado de alttensij aparatoj. Korepond.angle, ruse, japane, germane kaj precipe esperante. Resp. garantita.
S-ano. O. TREJTNER, Handel -Mazzettistr. 37, SANKT POLTEN, Aŭstrio, inter-ŝanĝas p.m. kun filatelistoj el neeŭropaj landoj.
K-do. Egon BROSCHE, Schillerschule, Kl.8,b, PIRNA, Germ.-DDR. Lernejklaso kun tridek 14jaraj knaboj dez. koresp. kun samaj el tuta mondo.
ESPERANTO-RONDO, Liceo Thän-Long, HANOI, Vietnamo, kun ĉiuj lernejoj interŝ. p.k., p.m., insignojn, infandesegnaĵojn ktp.
ESPERANTO-RONDO, Liceo Täo-Träo, HANOI, Vietnamo, kun ĉ. lernejoj, interŝ. il.p.k., p.m., insignojn, infandesegnaĵojn k.t.p.
ESPERANTO-RONDO, (knabinoj) Liceo Son-Täy, HANOI, Vietnam. Kiel supre ESPERANTO-RONDO, Popolarmea Artista kolektivo, Vän-Cöng Quän-Döi, HANOI, Vietnamo, kun ĉ. landoj pri muziko, kanto, danco, precipe kun junul. kolektivoj, kiuj partoprenos la VI.Festivalon en Moskvo
ESPERANTO-RONDO, Studenta Unuiĝo Liĕn-Hiĕp Sinh-Viĕn, HANOI, Vietnamo, kun ĉ. land. pri ĉ. temoj
ESPERANTO-RONDO, Junulara Unuiĝo, Liĕn-Hiĕp Thanh – Nien, HANOI, Vietnamo, kun ĉ. landoj pri *ju XXX* movado, kulturo kaj paco.
K-do. Ivan KOLEV, Str. *NedjalkoXX* 8 N-o.12, bl.3, SOFIA-13, kun ĉ. land.
K-do. Nikola G. KOLAROV, Str.*Tirmovo* No 21, KAZANLIK, Bulgario, kun tuta mondo per let. kaj il.pl.k.
K-dino. Stefka A. NOUĈEVA, „Trafia“ No 46, SOFIA-27, Bulgario (20jar) kun amikoj el tuta mondo.
STUDENTOJ de div. fakoj dez. *kor*. kun ĉ. landoj pri ĉiu temo. Adreso: SOFIA, Poŝtkesto 66, Bulgario / *kurso* de Esperanto ĉe Universitato
K-dino. Sonja ZEDNÍKOVÁ, MODŘANY č. 1462, u Prahy, Ĉeĥoslovakio k. ĉiuj land. per let. kaj il.p.k.
K-do. Helmut LOFFLER, Theaterstr. MITTWEIDA/Sa.Germanio-DDR. *Ni aranĝas* ĉiumonate letervespero. Ni dez. ricevi *koresponddezirajn* salutkartojn, infandesegnojn, *bildplakatojn* k.Esp-materialon. Nia Esp-pacrondo certe respondos.
K-dino. Erna KOHLER, Talstr.1, SENITZ/Sa.Germanio-DDR, Por *pacceloj* ni aranĝos letervesperon kaj ekspozicion por pruvi la *valo* de Esp-o. Skribu multnombre! Ni certe respondos.